


AMERIKA ESPERANTISTO

La Monata Bulteno de la Esperanta
Asocio de Norda Ameriko

AMERICAN ESPERANTIST

The Monthly Bulletin of the Esperanto
Association of North America



Joseph R. Scherer, President
Los Angeles, California

Ernest G. Dodge, Ch. Exec. Comm.
Washington, D. C.

Joseph Leahy, General Secretary

Centra Oficejo

1517 H Street, N. W., Washington, D. C.

Central Office

VOLUME 51, Number 8 - 10¢ per copy - \$1 per year - in any land - June 1937

The July and August numbers will be combined - out about August 1

NE BEDAURU POSTE KE VI NE EST IS EN VASINGTONO ĈE LA TRIDEKA
KONGRESO

ALL ROADS LEAD TO WASHINGTON!!!

July 1, 2, 3, 1937.

WHERE SHALL WE MEET AGAIN? (Melodio: Blue Bells of Scotland)

- | | |
|--|--|
| 1. Ho kie, ho kie rerenkontiĝos ni?
Ho kie, ho kie rerenkontiĝos ni?
Okazo post-nelonge al ni prezentos sin--
La proksima kongreso-ni ne forgesu ĝin. | 4. Ho kion, ho kion plenumos tie ni?
Ho kion, ho kion plenumos tie ni?
Plenumos nian devon al Esperanto ni--
Ja indega je nia subteno estas ĝi. |
| 2. Ho kiel, ho kiel veturos ni al ĝi?
Ho kiel, ho kiel veturos ni al ĝi?
Piede--flugmaŝine--aŭ kiel povas ni--
Sed nenio devigu nin resti for de ĝi! | 5. Ho kiun, ho kiun revidos tie ni?
Ho kiun, ho kiun revidos tie ni?
La gesamideanojn kredeble vidos ni--
Sed, se ne, la vojaĝo repagos nin per si. |
| 3. Ho kial, ho kial vojaĝos tien ni?
Ho kial, ho kial vojaĝos tien ni?
Ni tien iros ĉar ĝi ne venos tien ĉi!
Jes, ni iros al ĝi, ĉar ne venos ĝi al ni! | 6. Ho kiom, ho kiom da kosto havos ĝi?
Ho kiom, ho kiom da kosto havos ĝi?
Kompare kun valoro, ja kosto ĝi malpli
Ol aliaj objektoj por kiuj spezas ni. |
- (Originalo de H. I. Keyes)

WASHINGTON INVITES YOU TO THE XXX ESPERANTO CONGRESS FIRST WEEK IN JULY 1937

1937 Golden Jubilee Congress July 1, 2, 3.

NORTH AMERICAN ESPERANTISTS WILL HOLD THEIR THIRTIETH ANNUAL CONGRESS IN WASHINGTON, D. C., July 1, 2, 3, 1937. They will also celebrate the 50th YEAR since the WORLD AUXILIARY LANGUAGE-ESPERANTO-WAS PRESENTED TO THE PEOPLE BY DR. L. L. ZAMENHOF. THIS GOLDEN JUBILEE OF THE ESPERANTO MOVEMENT will be celebrated in every country on the globe. Every one interested in Esperanto will want to be known, in the years to follow, as a participant in the GOLDEN JUBILEE OF ESPERANTO. BE READY!

Whether or not you are sure of being with us, send for your Kongresa Bileto without delay - Local Congress Committee can use the money to finance preparations.

Congress Committee: Chairman, Mrs. C. J. Walter; Secretary, Kenneth F. Rogers; Treasurer, Miss Kathleen A. Prutz. Address all communications to 1517 H St., N. W., Washington, D. C. -- *****

CONGRESS HEADQUARTERS * HAMILTON HOTEL, 14th & K Streets, N. W.

All outside rooms, each with controlled air-conditioning, full-sized tub and shower, circulating ice-water, reading lamp and full-length mirror. Rates: Single, \$3.00 and up; Double, \$4.50 and up.

P I O N I R O J D e 1 9 3 7

En la komenco estis la ideo. La ideo estis en la kapo kaj koro de Dr. L. L. Zamenhof. Post kelk-jara fervora laboro naskiĝis lingvo. La lingvo estis simpla kaj facile lernebla. Sed mankis al ĝi vivo, ĝar ne estis literaturo, kaj ne estis homoj kiuj/ĝin paroli.

povis

Pasis jaroj. Inter 1887 kaj 1900 la nova lingvo komencis havi vivon. Iom post iom homoj lernis Esperanton, spite de mokado de nekredantoj. Iom post iom Esperanto ekhavis modestan literaturon - kaj gazetojn.

Pasis jaroj denove. Venis mondmilito. Sekvis jaroj de reorganizo. Kreskis armeo de samideanoj, kaj kreskis valorega literaturo. Ĉesis la mokado! Multaj gravaj organizoj aprobis kaj rekomendis Esperanton. Registaroj subtenis finance. La uzo de Esperanto disvastiĝis.....sed tro malrapide! Kial? Ne kulpas sole la indiferecenteco de la publiko. Multe pli kulpas la Esperantistoj kiuj ne komprenas ke oni povas venki la mondon nur per bone organizita armeo, en kiu ĉiu soldato helpas.

Multaj Esperantistaj armeanoj ne komprenas ke la plej energia laboro de la oficioj ne povas sukcesi sen la kunlaboro de la soldatoj. La ĝenerala sekretario kaj ĉiuj oficistoj kaj komitatanoj senpage laboras, ĉiu-semajne multajn horojn - eĉ multajn vesperojn. Tial ni kredas ke ni havas la plenan rajton peti digne, sed ripete kaj insiste ke ĉiu samideano en Norda Ameriko helpu. Ne ĉiu membro de EANA povas veni al Washington por labori kelkajn horojn en ĉiu monato en la Centra Oficejo. Sed ili povas helpi per modesta, tre modesta monsumo.

Se samideano estas konvinkita pri la grandioza valoro de Esperanto por la mondo de morgaŭ.....certe li ne povas rifuzi sian helpon. Por la modestega sumo de unu dolaro kaj duona li estas jam konsiderata regula armeano de la usona movado (EANA kun Amerika Esperantisto) kaj simpla membro de la Internacia Esperanto-Ligo. Tamen, estas sufiĉe multaj membroj de EANA kiuj tute forgesis sendi sian membro-kotizon al Washington. Ĉu vi ne volos esti membro en la Jubilea Jaro 1937, kaj aperi sur la ora, honora listo de la "pioniroj de la ora jubileo" - "way back in 1937".....? Se jes, agu rapide !!!

(Se vi malcertas ĉu via pago okazis antaŭ pli ol unu jaro, estas pli bone sendi vian kotizon iom tro frue, ol riski tute ne aperi sur la jubilea listo.)

Washington atendas vin! La Loka Kongresa Komitato laboris fervore dum multaj monatoj por certigi al ni ĉiuj plej agrablajn kaj neforgeseblajn tagojn kun laborkunsidoj, ekskursoj, belaj vesperoj, bankedo, ktp. dtp. Vi festos ne nur la 50-an jubileon de Esperanto, sed ankaŭ la 30-an kongreson de EANA. Ni festos kiel ideo fariĝis belega lingvo!

Eble vi ne ĝisvivos la 100-jaran jubileon de Esperanto, do vi pli bone paku viajn kofrojn, kaj venu al Washington, Julio 1 - 3.

Joseph R. Scherer

ESPERANTO ASSOCIATION of TEXAS is already showing that they meant it, when they started out in March, with high promise. The "Texas Esperantist" has doubled in size. It contains one sad item -- one of its brightest members, Miss Nell Pape, New Braunfels, died April 13th. To her family and associates we express our sincere condolence.

.....

The Bryan Club entertained - and was entertained - by Prof. Susuká of Orange, April 10, Esperanto phonograph records 'played' a large part in the demonstration lessons 'put on' by the Professor. He rendered great assistance to the new club.

FINAL 'DEBT FUND' REPORT OF THE FINANCE COMMITTEE. (May 31, 1937)

In December we announced the success of the drive against old debts. Since then we have been working to bring this drive to a conclusion. And although there are still a few unfulfilled pledges, the following list of donations seems sufficient to warrant this report: Washington, D. C., A. N., \$25.00. Florida, E. L. C. \$1.50. Michigan, J. H. M., \$10.00. Minnesota, Chapter No. 5, \$5.00, New York, S. C. E., \$24.00, Pennsylvania, H. W. H., \$10.00, Washington, W. G. A. \$20.00 \$95.00. Previously acknowledged in report of Nov. 15, 1936 \$852.50 Total... \$948.00

BE ON THE HONOR ROLL of JUBILEE YEAR, by being a PAID-UP MEMBER of EANA, before June 15

June One! "Oh boy! I can hardly wait! My expenses ran a little heavier last month than I expected. But I can't let that make any difference now. The GOLDEN JUBILEE CONGRESS needs me, - and I need it".

July One. "I'm here! And GLAD? What a question!"

PROGRAM OF THE JUBILEE CONGRESS, WASHINGTON, D. C., July 1,2,2 1937

PROGRAM OF THE JUBILEE CONGRESS, WASHINGTON, D. C., July 1,2,2 1937

June 30, Hotel Hamilton, all day - registration of arrivals. 8 p.m. Garden Party and Informal Reception, at the home of Mr. Charles Mason Remy, Massachusetts Avenue, N. W. Participants meet and go from Hotel Hamilton, Admittance by Congress Ticket.

July 1, 8 a.m. registration of arrivals. 9-9:15 Music and Singing before opening of Congress. 2:00 p.m. Second Congress Session. 8 p.m. "Tutesperanta Vespero" (ten minute Esperanto addresses on live topics by speakers/in advance; three minute talks by volunteer speakers.) invited

July 2, 9-9:15 Music. 9:15 Opening 2nd day business session. 1:30 "Generala Ekskurso" (Free to all congress ticket holders) personally conducted tour of principal Government Buildings. Photograph of the party survoje. 8 p.m. Public Meeting, Varied program of interest to Esperantists and Non-Esperantists - addresses in English, music, Ĉseh Method of teaching Esperanto - illustrated.

July 3, 9-9:15 music and singing. 9:15 Fina Laborkunsido. After close, "neform alaj ekskursoj" for those who wish--sightseeing a la carte for small groups, with guides. 8 p.m. "Kongresa Bankedo", followed by dancing. Bankeda bileto \$2.25.

July 4, No formal prearrangements. If groups of visitors desire to visit nearby attractions - Mount Vernon, Francoiscan Monastery, etc., parties may be made up informally (each paying own fare) with a local samideano as nucleus.

NE BEDAURU POSTE KE VI NE ESTIS EN VAŜINGTONO ĈE LA TRIDEKA KONGRESO. :

Taxi rate from any Railroad, or Bus Terminal to Hotel Hamilton is 20¢.

Celanoj festos kiel eble plej brile; sed ĝi ne devos esti nura festo.

..... PROXY VOTE

The undersigned member hereby appoints..... to act, in my absence, as my proxy, to vote on all matters where proxies are permissible, subject to instructions below:

Amendment - as outlined in May number - YES NO.
(For officers - on first ballot)

Vice President Treasurer Member of Executive Comm.

(signed).....
(member giving proxy)

ESPERANTO AMIKECO

Amikoj! Kia potenca vorto! Estas plej grave posedi ilin multnombre kaj fidele. Sed kiel feliĉa estas la Esperantisto, kiu ilin havas ne nur en sia loĝloko, sed ankaŭ en ĉiuj mondpartoj. Por li, la poŝta sistemo estas la magika ligilo kiu unuigas lin kun liaj korespondantoj tra la tuta mondo. Kaj kion oni povas akiri per korespondado Esperanta? Sincerajn amikojn, plenan informon pri ties vivmanieroj, politiko, arto, ĉio kio efektiviĝas la homan kulturon.

Mi pensas nun pri tri el miaj korespondantoj. Loĝante en plej diversaj, malproksimaj anguloj de la mondo, ili signifas por mi la naturo kaj la animo de siaj landoj. Kaj krom la internaciismo, kion ĉiu montras, kiel klare mi povas vidi la nacian spiriton speguligitan en la pensoj de ĉiu.

Viktorino, estas hispanano. Li ekfinis sian soldatservon ĝuste kiam mi konatigis kun li. De liaj vivaj frazoj mi vidis klare la spritan animon de iu kiu komprenas la belecojn de la vivo. En ĉiu letero de la antaŭe mirinde belega Andaluzio venis bildo de kolorplena hispana pejzaĝo aŭ de iu arta trezuro. Viktorino deziris lerni la anglan lingvon, kaj ĉiu letero enhavas kelkajn paragrafojn angle skribitajn, pli-malpli korekte, sed montrante bone la persistadon de tiu ĉi junulo kiu havis la kuraĝon instrui sin en la komplika angla lingvo. Mi ĉiam korektis lian anglan, kaj kiel puno por liaj eraroj, mi devigis lin legi kelkajn paragrafojn de mi hispane skribitajn, pli-malpli inteligente. Kaj nun terura milito dividigas lian landon, kaj mi miras ĉiutage ĉu mia hispana amiko estas sekura en lia malfeliĉa lando, kaj ĉu la kruela batalo ŝparos lin por la pli granda laboro kion li devas fari.

Mi vojaĝas per la okulo de mia menso nun al Rusujo, al Aleksandro, tiu saĝa, lerta junulo kiu elspiras la atmosferon de la tipa malgajarusa koro. Membro de la Komunista Partio, li estas tro honesta kaj justa por obei blinde la dekretojn de tia absoluta potenco, kaj konsekvence, oni forsendis, lin al malbona, senĝoja posteno kiel statistikisto en lia malgranda urbeto. Li brulege deziras esti ĵurnalisto, kaj malsate demandas de mi veran, objektivan informon pri mondaĵ aferoj. Sed mi min flatas sufiĉe por kredi ke miaj malmultaj vortoj estas guteto de kontenteco al lia malgaja animo.

Turnu vin kun mi al pli gaja aspekto. En Nederlando, tiu remparo de la Esperanto Movado, loĝas bona amiko, Johano. Liaj leteroj estas plenaj de tiu praktika, fortika idealismo kiu estas la naskiĝrajto de ĉiu holandano. Laboranto en fabrikejo, li elspiras la kontenton de sia apudmara, energia lando. Kaj por li la paco estas lia plej fervora dezito. Li ĉirkaŭrigardas sin, vidas la dangeran situacion de la landoj ĉirkaŭantaj Holandon, kaj ni ne miru ke li ĉiam preĝas por paco.

Estas sendube la konstanta espero de ĉiu Esperantisto ke li iam renkontos siajn korespondadajn amikojn, kaj tiel povos paroli pli intime kun ili. Mi tiun ĉi esperon tenas ankaŭ, kaj mi scias ke, ironte al eksterlandoj, ili tute ne estos fremdaj por mi, ĉar miaj skribaj kamaradoj glatigos ĝoje la vojon antaŭ mi. Sed, se kune kun la plimulto da la Esperantistoj, mi devos resti hejme, mi scias ke mi povos per mia vere internacia ligilo komuniki plej facile kun miaj korespondantoj, kaj, kion mi ne povus fari per la nacia lingvo, mi povos klare vidi la profundajn, bazajn naturojn de tiuj ĉi tre malsamaj homoj. Tiuj ĉi tri skizoj montras la esencan malsamecon kio ekzistas inter personoj, sed pli grave, ili montras ke ili ĉiuj havas multajn similecojn, unu al la alia.

(First Prize Winner)

Charles E. Simon (Age 20)
2651 Idlewood Road
Cleveland Heights, Ohio.
March 19, 1937.

THROUGH THE EFFORTS of Fervorulo Conrad Fisher, Meadville, Pa. an'after-study-hour' class in Esperanto is being considered, and he succeeded in getting the City Library to hold an Exposition of Esperanto literature, etc., arousing international interest to the extent of inducing the Library to collect dolls in the costumes of all nations - send yours in.

NEKROLOGO. Ree estas nia malĝoja tasko diri al la Esperantistaro ke alia el niaj bonaj anoj forlasis nin por iri al la ejo de la eterna ripozo. La 30-an de Aprilo mortis en Braintree, Mass., Usono, Sinjoro E. L. Southwick, kiu multajn jarojn laboradis por nia afero, kiel ano de la EANA, kaj Esperanto Societo de Boston. Ni esprimas al la familio kaj liaj amikoj sincerajn kondolencojn.

KURESSAARE, Esthonia, world famous as a Health Resort, has just issued a beautifully illustrated 12 page prospectus in Esperanto, with colored map of Esthonia, and photogravures of scenics, bath houses -- especially the Slimkuracejoj.

MUN, LA GRANDA KARAVANO TRAIROS ESPERANTUJON kie vi renkontos amikojn el multaj landoj.

A L V A R S O V I A K O N G R E S O

Kelkaj el niaj eminentuloj jam aliĝis, kaj alvokas vin, farigu grandan Usonian Delegitaron unufoje ĉe eksterlanda Kongreso. Multaj gajaj Esperanto-vesperoj estos ĝuitaj survoje tra Esperantujo. Estas grandega okazo por perfekti vian Esperanton. Ni gajvivos naŭ tagojn en skandinavujo, dek-kvin en Scvetlando, semajno ĉe la Jubileo, kaj dek-unu en Centra Eŭropo kaj Francujo. (Post kongreso vi povos ĉeesti je Esperanto-Domo en Nederlando anstataŭ Centra Eŭropo.) Tuj post la Vaŝingtono-Kongreso ni ekiros en la M.S. "Batory", iri de Nov-Jorko, Julio 4, reiri Sep. 3. La kosto de la vojaĝo. tutinklusive al Varsovio, kun tuta transportado de Nov-Jorko, estas nur \$446. en la Tria Klaso, kaj \$612 en Dua Klaso.

ALIGU TUJ - Adresu korespondojn al GEORGE A. CONNOR, Turismo-Delegito de I.E.L. 30 Perry Street, New York, N. Y.

"A Picture is Worth 1000 Words" - Postage stamp type & size - gummed, ready to stick from any picture. 100 for \$1.00, 500 for \$4.00, 1000 for \$7.00. Original unharmed. For birthday, gift, graduation - all kinds of greeting cards. Gem Photos - 1 1/2 x 2 1/4 - 25 for \$1.00 or 50 for \$1.50. Dr. Zamenhof - 5x7, 25¢ - 5 for \$1.00; 8x10, 65¢; Postcard, 10¢, 3 for 25¢, 25 for \$1.00. (Gems) 25 for \$1.00. (Many people sailing for Europe - or around the world - are laying in a supply, to give, as souvenirs, to friends on the way).

"VERHÄLTNISWÖRTER DES ESPERANTOS" von Wüster. Anybody knowing where this book can be procured - bought or borrowed (temporarily) will be conferring a favor on Mr. Chas. H. Briggs, 12 Old Colony Bldg., Minneapolis, Minn., who wishes to buy a copy. Write him. Dankon.

MISS JULIA MAY LEACH, Daytona Beach, Fla., and Salem, Mass., made a splendid address to about 100 Rotarians, in Daytona Beach, April 12th, holding their rapt attention, while she outlined the origin, growth and prospects of Esperanto. Local papers were generous in praise - well deserved.

"ĈIELARKA STANDARDO" estas la unua kaj sola internacia kooperativa gazeto esperantlingva. Originalaj artikoloj el teorio, historio, nuna stato, praktiko kaj bibliografio de kooperativismo el ĉiuj landoj. Jara abono 7 sv. fr., pageblaj ankaŭ kvaronjare.

Interesatoj petu specimen - Nron ĉe la Eldon-Kooperativo "Spólnota Pracy" Warszawa (Varsovio) str. Marszalkowska 149-9, Pollando.

OLYMPIC GAMES OF 1940 will be held in Tokio, and the Japanese are already busy in their efforts to make the visitors' stay a pleasant one. Having in mind the indescribable chaos, due to language differences, at the Olympics of 1936 (held in Germany) a special committee of the Japanese Esperanto Society, coordinating all work and doing everything possible to remove the language barrier, have opened special classes in many government schools - and to every sports group in Japan they sent a letter thanking them for their tireless and unselfish efforts (Extract: "Blessed be the sportsmen who will enjoy peacefully and in harmony a contest despite the diversity of language and race. But we believe that if the difference of language did not exist a more agreeable atmosphere would reign. Therefore we hope that you will please use ESPERANTO as the official language".

Mr. Dormont was responsible for having an 8 inch article along the above lines, published in the N Y "TIMES" - May 8. An editorial note jokingly invites: "All out for the broad jump and the Esperanto Class".

La HUNGARLANDA KATOLIKA SOCIETO: adreso, Budapest. Petófi Sandor u.9.IV.3.Hungary. Eldonas, ekde januaro 1937, dulingvan revueton: "Katolikusok Csillaga. Katolika Stelo, celante propagandon kaj informadon. Ili petas la tutmondan katolikaron, bonvolu informi ĝin pri ĉiuj okazintaĵoj, kiuj taŭgas por interesi ankaŭ alilandajn katolikojn. kun danko akceptas artikoletojn pri nuraj katolikaj temoj--ĝis 1000 vortoj.

TAXI RATES FROM RY., BUS, OR BOAT TERMINAL TO HAMILTON HOTEL IS 20 CENTS

A L L A U S O N A S A M I D E A N A R O

Ĉu vi intencas iri kongreson, nacian aŭ internacian, ĉijare? Se jes, aĉetu viajn biletojn por vojaĝo, ĉu surŝipe, aere aŭ omnibuse, ĉe la VILLEMIN TRAVEL SERVICE, 145 East 57th Street, New York City, New York. Kie oni korespondas en Esperanto.

La VILLEMIN TRAVEL SERVICE interrilatas kun ĉiuj vaporŝiplinioj, transoceanaj kaj marrandaj, kaj povas pro siaj bonaj personaj rilatoj kun la oficistoj de la diversaj linioj, akiri la plej bonajn servadojn por vi. Adresu vian korespondojn al : - F-ino Louisa J. Hertweck, c/o - VILLEMIN TRAVEL SERVICE, 145 E. 57St New York, N.Y.

The name of every member not in arrears, will appear on the ESPERANTO 50 YEAR HONOR ROLL. You may not be present at the 75 year Jubilee - BUT coming generations will point to that 1937 HONOR ROLL, and say, with pride "Mother-Father-Grandpa-Grandma-Aunt or Uncle was one of those PIONEERS IN THE ESPERANTO MOVEMENT." Be sure your name is not omitted. (IF YOU DON'T KNOW when your year of paid up membership ends, be on the safe side and send \$1.50 at once. Your membership will be extended properly.)

July 1-2-3 J U B I L E E C O N G R E S S 1 9 3 7
 H a m i l t o n H o t e l W a s h i n g t o n , D . C .

Besides the business sessions there will be addresses by well-known speakers. An excursion through the principal government buildings is slated for the 2nd. A stock of Esperanto books, etc., will be on display and there will be a demonstration of the Ĉseh method of teaching Esperanto.

The Price of Congress Ticket, covering everything but the banquet, is \$3. Help the Congress Committee - and the Esperanto Movement - by subscribing--even if you be there only in spirit.

ATTEND THE CONGRESS BY PROXY -- If you cannot attend the Congress why not help some other Esperantist to attend? Esperanto is now in position for a new start and there are, doubtless, some of the older Esperantists who would count it a privilege to help some of the younger ones to attend a National Congress.

NE BEDAŬRU POSTE KE VI NE ESTIS EN VASINGTONO ĈE LA TRIDEKA KONGR ESC

GOOD NEWS. The new catalog of the WARTBURG COLLEGE, Waverly, Iowa, which has recently appeared, offers to accept two years of Esperanto as of equal value with that much Latin, French or German for entrance, and sufficient foreign language for graduation. WARTBURG is the Mid-western college of the American Lutheran Church. Fifty of its students have sent in a joint petition to Postmaster General Farley, for an Esperanto Memorial Stamp.

- - - - -

The Esperanto activities of Fervorulo Giles H. Sharpley are largely-if not wholly-responsible for the successes of Nia Afero in his community - WAVERLY. More power to him.

LEARN ESPERANTO. A course of 12 EASY and COMPLETE lessons. Has been used successfully long enough to prove its worth. 10¢ postpaid - 3 for 25¢, or 15 for \$ 1.00. Sample lesson for 3¢ stamp. E. Simon, 2651 Idlewood Road, Cleveland, Ohio.

MR. LOUIS DORMONT, Chairman of the Education Committee of EANA sent questionnaires to the heads of schools and colleges throughout the USA, in reference to "ESPERANTO in the SCHOOLS" and to date has received favorable replies from over 2/3 of them. Mr. Dormont is doing so much in the line of making Educationalists ESPERANTO-MINDED that everyone conducting an Esperanto class, or knowing of classes should lose no time in acquainting him of the fact. - A postal will do, and his address is: 123 E. 35th Street, Brooklyn, New York.

Jubilea kongresano, Ĉefmembro de usona esplorkomitato por nordameriko pri lingva afero, preskaŭ finis kvinjaran kaj intensan studon de la ORIGINALA VERKARO de Zamenhof. Kvankam li raportos publike pri lia agado, kongresanoj kiuj ŝatus detale havi iom da nova kaj grava informo pri la stilo de tiu plej grava esperantisto, fondinto de nia lingvo, povus leteri lin detale kaj plane pri la plej taŭga maniero por tiuj koncernotaj. Kiel pli taŭge povus oni festi la memoron pri la plej bona verkisto en esperantujo, olp per la taksado detale de lia kolekto de verkoj? Let-eru Fenton Stancliff, 1106 Big-Falls Avenue, Akron, Ohio.

HO SAMIDEANOJ, ne permesu ke timo ke la Ĉefhotelo estos eble tro plena detenu vin for de la Kongreso, Ĉar estas aliaj bonaj hoteloj-komencantaj je unu dolaro potage.

AIL NOT IN ARREARS June 15th will have their names on the JUBILEE YEAR HONOR ROLL. (If in doubt on your date, extend your membership one year, with payment of \$ 1.50)

TAXI RATE FROM ANY TERMINAL TO CENTRAL OFFICE OR HAMILTON HOTEL IS 20 cents.

Se ne estas Delegito en via Urbo, Urbeto aŭ Vilaĝo, Kaj vi estas preta, kaj kapabla tiel agi, bonvole sciigu la Centran Oficejon, Ĉiu loko devas havi delegiton.

CAN YOU IMAGINE ANYTHING MORE INTERESTING than getting the NEWS of what people of 60 or 70 other countries are doing - especially other ESPERANTISTS; of what the Governments of the world are doing about ESPERANTO - as you perhaps know, some of them have taken it up in a BIG way, using it officially. Become a member, not only of the E. A. N. A. but also of the International Esperanto-Ligo, including the Year-book, and either the weekly "Heroldo de Esperanto" or the monthly "Esperanto-Internacia". These papers circulate in nearly 70 countries, and are of absorbing interest. The Yearbook, or either of the papers are worth the price of all. See combination rates on Green Page.

BE SURE OF YOUR PLACE ON THE JUBILEE HONOR ROLL by HAVING 'PAID-UP' CARD-EANA & IEL

WASHINGTON INVITES YOU TO THE XXX ESPERANTO CONGRESS FIRST WEEK IN JULY 1937

Always CARRY THE GREEN STAR-the Magic Key to Human Hearts-the Esperanto Emblem in the buttonhole. Every esperantist should proudly carry it. Green star with golden "E" and golden protectors on points. Choice, screwback 40¢, Safety catch 50¢. Esperantists and Friends of Esperanto. W E A R T H E M.

MEMBERSHIP RATES

- M - EANA and IEL, with "American Esperantist" \$1.50
- MJ - EANA - IEL, with "American Esperantist" and Jarlibro 2.50
- MA - EANA and IEL, with "AE" Jarlibro and "Esperanto Internacia" (Monthly) 4.00
- MAH - EANA and IEL, with "AE" Jarlibro and weekly "Heroldo de Esperanto" 6.50
- MS - EANA - IEL - Jarlibro, may receive both weekly and monthly publications, or may elect to receive instead of the weekly "Heroldo de Esperanto" a selection of book premiums from an already published list - ask for it. 8.50

The Jarlibro (Yearbook) is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the world, Esperanto organizations, publications, and all sorts of information necessary to any one wishing to "BE UP" on Esperanto affairs.

TEXTBOOKS; "Practical Grammar" by Dr. Ivy Kellerman-Reed, member of the World Language Committee. A course suitable for all grades. The most popular textbook on the American Market 75¢

FRODING'S "Easy Course in Esperanto" - a splendid 'starter' of 8 lessons. 10¢

SUSSMUTH'S "American Esperanto Key" - Grammar and Vocabulary" 5¢

"EDINBURGH POCKET DICTIONARY" 288 pages, size 4x6, indispensable to any Esperantist. You will want one eventually - GET IT NOW \$1.00

MILLIDGE Esperanto-English Dictionary \$2.75

Easy and interesting reading "Fabloj de Ezopo" 25¢ "Zamenhofa Legolibro" 25¢

"Sub la Meznokta Suno" (Wendell) 25¢ "Sep Ridoj" (Wendell) 25¢

"Facilaj Esperantaj Legaĵoj" 50¢ La Voje Returne (Remarque) \$2.00

"Akrobato de Nia Sinjorino (Payson) 25¢ "Ginevra (Privat) 25¢

Blanche, Virgulino de Lille (Payson) 25¢ "Miserere Kaj Thais" (Payson) 25¢

"La Karto Mistera" Tre intriganta 25¢ "Unua" 10¢

Juneco Kaj Amo (Boards) 25¢ Paper 15¢ Short Outline of Esperanto 10¢

Lando de Argenta Akvo (Roe-Payson) 15¢ Radio Manuelo 25¢

Mopso de la Onklo (Chase) 15¢ Jos. Rhodes "Early Days of Esperanto

Princo Vanko (Putman Kaj Beetes) 25¢ in England" (Esperanto) Cloth \$1.00

Rozujo Ĉiumiljara (Wagnallis-Payson) 35¢ Paper, 75 cents.

Rakonto kaj Aventuro (Hall-Bacoll) 15¢ "Piramo kaj Tizbeo" (W.G. Adams) 10¢

Taso de Amservo (Taylor-Weems) 25¢ Surprises at Sylvia Farm (H.W. Fisher) 10¢

"Guide to Esperanto" (former price 25¢) 15¢ - This book is for self instruction class use, and correspondence work, as well as to guide the Esperantist in the study, teaching, use and propaganda of Esperanto. Only a few left - HURRY!!!

"Fundamento de Ispografio" by Fred A. Hamann 55¢ - La baza libro, de IPSO aŭ Internacia Steno-Pazigrafio, kiu signifas internacia mallongskribo por ĉiuj kaj estas intencata fariĝi la dua skribo por ĉiuj, simile al Esp-o, la dua lingvo por ĉiuj.

Guide to English Espography (For acquiring speed) 60¢

Ŝlosilo de Esperanta Ispografio 10¢ Key to English Ispography 10¢

"Kiel Plaĉas al Vi" (Kellerman) 35¢ & 50¢ Clave de Ispografia Espanola 10¢

Schlüssel der deutschen Ispografie 10¢ Correspondence courses in Ispo. Including books \$2.00

ADVERTISING. Small ads., 1¢ per word - minimum 25 words. Space 1x3 1/2 inch, 50¢--3 times for \$1. Full page \$4. - special on several issues.

NI ATENDAS VIN KUN MALFERMITAJ BRAKOJ - VENU AL VAŜINGTONO LA BELA

Esperanto Association of North America 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.